

## Redakta noto

La malgranda membraro de ISAE pli kaj pli malmultnombriĝas. Kun morno ni adiaŭas fidelan ISAE-anon *Lawrence Mee*, kiu forpasis la 27an de oktobro 2002 en *Manchester*, Britio. Kaj grave trafis ne nur nian Asocion, sed tutan Esperantujon, la neatendita morto de brazila ISAE-anino *Symilde Ledon*: pro akcidento, kiu ankaŭ mortigis ŝian edzon *Gilbert*, aŭtoro de multaj pensigaj gazetartikoloj; mi bone memoras nian – bedaŭrinde unuan kaj samtempe lastan – renkontiĝon dum la Fortaleza UK kaj nian instigan diskuton pri lia serio de unikaj broŝuroj "Fakaj Kajeroj" en scienc-teĥnika, sed tute ne peza, faka lingvaĵo. –

La sekva tabelo montras, ke la ĝisnunaj ISAE-membrokotizoj tute ne plu kovras la eldon- kaj sendokostojn de nia asocia organo, ĉar enorme plialtiĝis la afrankokostoj ekde januaro 2003. Kvankam la afranko por prespoŝtaĵoj ene de Germanio restis la sama (€ 0.77 por pezo ĝis 3 SR-kajeroj = 250 g) kaj la leterafranko por Germanio kaj EU-landoj eĉ reduktiĝis je 1 c (de iama 56 €-centoj al "nur" 55 c por leteroj ĝis 20 g), la ruzaj poŝt-oficistoj lerte egaligis tian "perdon" per novaj, multe pli altaj kostoj por **presaĵoj/libroj** al landoj en kaj ekster EU:

	en Eŭropa Unio kaj al transmaraj landoj		
	ĝis	ekde	
	2002-12-31	2003-01-01	plialtiĝo je
1 SR-kajero (ĝis 100 g)	€ 1.02	€ 1.20	+ 18 c
2 aŭ 3 SR-kajeroj (ĝis 250 g)	€ 1.28	€ 1.70	+ 42 c
pli ol 3 kajeroj (ĝis 500 g)	€ 1.79	€ 2.60	+ 82 c

Tio grave pezas sur la forsendo de Scienca Revuo – kaj sur la ekonomio de ISAE ĝenerale. La sekvo: Scienca Revuo estonte ricevos nur tiuj ISAE-anoj kaj interesatoj, kiuj vere ĝustatempe pagis la membrokotizojn al unu el la en ĉiu kajero klare sur interna kovrilpaĝo indikitaj ISAE-kontoj. La nova estraro de nia Asocio devas decidi dum la venonta ISAE-jarkunveno kadre de Gotenburga UK pri eventuale a) plialtigi la membrokotizojn aŭ b) redukti la jaran eldonon de nuntempe 4 kajeroj po SR-jarkolekto al 3 kajeroj (tamen plialtigi anstataŭe ĉiun unuopan kajeron per 6-8 paĝoj, t.e. per tiom da paĝoj kiom restas en la poŝtafranka pezolimo po sendaĵo). –

Mi esperas, ke multaj ISAEanoj partoprenu nian ĉi-jaran asocian dum-UK-an jarkunvenon por pridiskuti ankaŭ inter ni la strategiforuman interesan temon "Kiel scienco helpu nin – kiel ni helpu al la scienco".

Kun elkoraj salutoj

Prof. Dr. R. Sachs, prezidanto de ISAE

## Originalaj artikoloj

## La konkerado de Marso

Jacques JOGUIN

## Marso en la antikvo aŭ "Marso la Dia"

Marso plej freŝe memorigas nin pri la malgranda aparato *Sojourner* (= pasloĝanto, tamen ĝi restis sur Marso poreterne), kiu promenis sur Marso kaj sur niaj televidekranoj en julio 1997. Multaj el ni pensas ankaŭ pri la marsanoj, eĉ se oni hodiaŭ scias, ke marsanoj ne ekzistas. Sed en la antikvo? Ĉu oni konis Marson? Kaj se jes, kiel oni vidis ĝin? Niaj prauloj, la sumeranoj, la egiptoj kaj la grekoj ekzemple. Por ili, ĝi estis vaganta astro, t.e. planedo.

La vorto devenas fakte de la grekoj, por kiuj *planetes* signifis vaganton. Kial? Ĉar la antaŭuloj (kiuj konis 5 planedojn videblajn nudokule: Merkuro,

Venuso, Marso, Jupitero kaj Saturno) rapide rimarkis, ke tiuj astroj, kvankam ili aperas kiel

lumaj punktoj en la ĉielo – same kiel la steloj – moviĝas fakte inter ĉi lastaj kaj ne scintilas kiel tiuj. Oni ankaŭ sciis, ke ili povas iri returnen (en astronomio oni nomas tion "retroirado"). Kaj tiu fenomeno estas tre karakteriza por Marso. Ili fine sciis, ke Marso estas ruĝa. El tio venas la latina nomo de "Marso" - Dio de la milito, ĉar la ruĝo estas simbolo de sango kaj fajro.

Oni vidas, ke niaj antaŭuloj sciis multajn aferojn. Sed ĉar ili ne havis pligrandigajn instrumentojn, la grekoj konsideris, ke la planedoj rondiras ĉirkaŭ la nemoviĝanta Tero. La Tero ne estis por ili planedo. En la jaro 150 p.K. Ptolemeo (87-165) proponis la geocentran modelon, kiu restos la referenco ĝis Koperniko (1473-1543) – do, dum tempoperiodo de preskaŭ unu kaj duona da jarmiloj.

